

ESPERANTOLEHTI

Esperanta Finnlando ♦ Esperantobladet ♦ lokakuu ♦ oktobro ♦ 5/2001



En la stoko de libroj, kiujn posedas ELFI, la nova prezidanto Carola Antskog trovis ege interesan libron pli didaktikaj kaj psikologiaj aspektoj de lingvolernado. – Intervjuo de Carola Antskog sur paĝo 5.

ESPERANTOLEHTI

Esperanta Finnlando ♦ Esperantobladet

ISSN: 0787-8206

Kielipoliittinen aikakauslehti. Suomen esperantoliitto ry:n äänenkannattaja.

Språkpolitisk tidskrift. Organ för Finlands Esperantoförbund.

Lingvopolitika periodaĵo. Organo de Esperanto-Asocio de Finnlando.

Perustettu/Grundad/Fondita 1918. Esperantolehti ekde/från 1989 lähtien.

Esperanta Finnlando 1918-23, 1948-53, 1959-1987.

Ilmestyy kuusi kertaa vuodessa. Utkommer sex gånger i året. Aperas sesfoje jare.

Toimitus/Redaktion/Redaktejo: *Aimo Rantanen*

PL 2, 40801 Vaajakoski. ☎ (014) 261 438 ✉ esperantolehti@esperanto.fi

Taitto/Layout/Enpaĝigo: *Ilkka Santtila*

Tollinpolku 1 B 21, 00410 Helsinki. ☎ (09) 530 1804 ✉ ilkka.santtila@esperanto.fi

Tilauhinta/Prenumerationspris/Abonprezo: 80 mk/vuosi/år/jaro;

Jäsenille/ För medlemmar/ Por membroj: 60 mk; Baltio 60 mk, aliaj landoj 80 mk.

Tilaukset, osoitteenmuutokset/Abonoj, adresŝanĝoj:

Suomen Esperantoliitto, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. ☎ (09) 715 538

Prenumerationer, adressförändringar: EAF, Broholmmsgatan 15 C 65, 00530 Helsingfors.

Postisiirtotili/Postgirokonto/Poŝtĝirkonto: 800017-230825.

Julkaisija/utgivare/eldonanto: Suomen Esperantoliitto – Esperanto-Asocio de Finnlando.

Painosmäärä/Eldonkvanto: 400

Esperanto-Asocio de Finnlando ♦ Suomen Esperantoliitto

Fondita/Perustettu/Grundad: 1907

Prezidanto/Puheenjohtaja: *Jukka Laaksonen*

Uudenkylänkuja 2 B 11, 33530 Tampere. ☎ (03) 255 4724; (050) 5829 248; työ/laboro: (03) 249 3313

Vicprezidanto/Varapuheenjohtaja: *Anna Ritamäki*

Dragsfjärdsvägen 690, 25700 Kimito. ☎ (02) 423 146 ☎ (02) 423 246 ✉ anna.ritamaki@kolumbus.fi

Sekretario/Sihteri: *Tiina Oittinen*

Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku. ☎ (02) 230 5319 ✉ tiina.oittinen@pp.inet.fi

Aliaj estraranoj / Hallituksen muut jäsenet:

Anna-Liisa Heikkinen, Asiakkaankatu 2 G, 00930 Helsinki. ☎ (09) 343 1449 ✉ anna-liisa.heikkinen@sci.fi

Esa Lång, Lokinkatu 5, 15610 Lahti. ☎ (03) 735 2723

Päivi Saarinen, Ruorimiehenkatu 5 C 23, 02320 Espoo. ☎ (09) 813 3217 ✉ paivi.saarinen@iki.fi

Ritva Sabelli, Pietarinkatu 10 D 27, 00140 Helsinki. ☎ (09) 635 902 ✉ ritva.sabelli@sfs.fi

Vicestraranoj/Varajäsenet:

Eila Martin, Intiönpolku 4 as. 36, 90100 Oulu. ☎ (08) 374 697

Raita Pyhälä, Jykyrintie 3, 69440 Lestijärvi. ☎ (06) 863 7351 ✉ raitapy@jymy.kase.fi

Jukka Vaijärvi, Neulapadontie 3 C 21, 00920 Helsinki. ☎ (09) 349 7334 ✉ jukka.vaijarvi@dinosoft.fi

Rahastonhoitaja/Kasisto: *Antti Mikkola*

Ruorimiehenkatu 5 C 23, 02320 Espoo. ☎ (09) 813 3217 ✉ antti.mikkola@orion.fi

Postisiirtotili/Poŝtĝirkonto: 800017-230825.

Toimisto/Officejo: Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, avoinna tiistaisin klo 17-19.

☎ (09) 715 538 (puh.vastaaaja/automata respondilo). Malfermita: marde 17-19-a horo.

UEA:n pääedustaja / Ĉefdelegito de UEA: *Heta Kesälä*

Kalamiehenkuja 3 D 32, 04300 Tuusula. ☎ (09) 275 5528

Postisiirtotili/Poŝtĝirkonto: 800029-19438647 (maksut UEA:lle/ pagoj por UEA).

Internet: <http://www.esperanto.fi>

Ĉu lingvohobiado subgrundiĝos?

En septembra numero de Mikrobitti, periodaĵo por komputilemuloj, estis interesa artikolo pri tradukprogramoj. La verkinto de artikolo diras ke la duono el tradukaĵoj en Eŭropuniaj instancoj estas farita per tradukprogramoj. Per tradukprogramo oni faras unue la maĉlaboritan tradukon, kiun oficiala EU-tradukisto poste editas kiel pretan.

Laŭ Mikrobitti ene de sekvontaj dek jaroj inĝenieroj konstruas porteblan tradukilon, kiun partoprenantoj de diverslingvaj kunvenoj havas kun si. La posedanto de tradukilo instruas la tradukilon al sia propra lingvo parolante en ĝi ĝeneralan skriban lingvon iom da tempo. Dum la diverslingva kunveno la partoprenantoj aŭdas el sia tradukilo direktan tradukon en sia gepatra.

Prezentado de tia tradukilo nuligas preskaŭ ĉion per kio ni ŝatokupantoj de Esperanto porparolas nian lingvon internacian. Pozitive estas, ke per tia tradukilo oni aŭdas sian gepatran. Ĝis nun oni ja klopodis instrui al la tuta mondo nur unu lingvon, la anglan. La argumentoj pri Esperanto kiel pontlingvo

kaj propedeŭtika lingvo ŝajnos esti senbazaj, se la tradukilprojekto sukcesos.

La verkinto de Mikrobitti-artikolo prediktas ke estontece lingvojn studas super ordinara nivelo nur programistoj de tradukprogramoj. La situacio de nun estimataj naciaj lingvoj ekster sia parolteritorio ŝajnas esti estontece minacata. La subtileco je la lingvo ne malaperos el la mondo. Sed per tiutipa talento la lingvostudentoj eble ne gajnos sian panon. Eble la studado de eĉ grandaj estimataj naciaj lingvoj similos la situacion de nuntempa Esperanto-hobiado? Eble la lingvostudado iras subgrundon.

Kion ni esperantistoj povas fari en tradukil-eraro? Ni emfazu tion en kio Esperanto estas forta. En internaciaj kontaktoj, ofte tre modestaj. En individua kresko al internacieco, kio estas subteninda afero en la mondo de malamo kaj teroristatakoj. En Esperanta kulturo, kiu subtenas nian lingvon. Ĉu en subgrundo, ĉu en la oficiala mondo, nia afero estas tiel originala, ke ni daŭrigu ĝin.

Aimo Rantanen

Abonkotizoj de Esperantolehti por la jaro 2002

La estraro de EAF decidis en sia kunsido la 18-an de aŭgusto, ke la jarkotizoj de Esperantolehti por la jaro 2002 estu 13,50 eŭroj por unuopaj abonoj kaj 10 eŭroj por kolektivaj abonoj pere de lokaj societoj kaj al Baltio. Dum la jaro 2001 eblas pagi por la jaro 2002 laŭ la nuna abontarifo en markoj.

Koncerne la vendoprezojn ĝenerale okaze de la ekvalido de eŭroj, la estraro decidis, ke ĉiuj prezoj estu rondigitaj al plej proksima egala eŭrosumo, ĉu pli supra ĉu pli mal-supra, rilate al la marka sumo dividita je la oficiala koeficiento 5,94573.

La estraro

Multlingveco kaj duonlingveco

Komenciĝas la aŭtuno de la Eŭropa jaro de Lingvoj. Kvankam la jara temo estas ege bona kaj inda por esti multe pritraktita kaj diskutita, tamen ŝajnas, ke en la amaskomunikiloj oni relative malmulte notis la jaron. Ĉu la temo eble ne interesas, ĉu eble oni opinias, ke lingvaj problemoj ne ekzistas, ĉu pro iu alia kialo. La komencanta aŭtuno kaj ties aranĝoj, kiuj kulminas post kelkaj semajnoj okaze de Tago de Lingvoj, montros ĉu finfine la jaro fariĝos pozitiva fenomeno. La jaro estis lanĉita por vekigi publikan intereson al lingvoj kaj precipe al pli malmulte konataj lingvoj de Eŭropo. Sed se finfine ĝi tion ne faras, estus domaĝe por la lingva situacio.

Oni multe emfazas la gravecon de lingvolernado. En Finnlando ni ja devas lerni fremdajn lingvojn en lernejo. Kvankam multaj homoj ne estas lingve talentaj aŭ simple ne ŝatas lerni lingvojn, tamen preskaŭ ĉiu sufiĉe juna denaska finnlandano posedas almenaŭ ioman lingvokapablon. Multaj lingve talentaj kaj interesitaj kapablas akiri bonan kaj eĉ perfektan lingvoscion, eĉ en pluraj lingvoj. Ili povas fariĝi vere multlingvaj. Nuntempe jam infanoj sub lerneja aĝo povas kompreni iomete almenaŭ la anglan pere de televido kaj muziko. Sed la aliaj lingvoj restas multfoje je la nivelo, kiun oni akiris dum la lernejo. Estas evidente, ke

malgraŭ lernado de pluraj lingvoj multaj homoj ne havas sufiĉan scion por paroli aŭ skribi en iu ajn el ili.

Dum la lastaj jardekoj ankaŭ Finnlando ricevis jam konsiderindajn lingvajn minoritatojn pere de rifuĝintoj kaj enmigrintoj. Por elturniĝi en nova lando ili devas lerni ĝian lingvon, almenaŭ iomete. Egale la aŭtoritatuloj alfrontis devigon por aranĝi instruadon en lingvoj, en kiuj ili apenaŭ trovas instruistojn. Mi ofte pensis, kio okazas en la lando, kie fremda lingvo (ekz. nun la angla) samtempe tre forte influas la lingvon de la denaska loĝantaro. Ĉu la enmigrintoj ne pli volonte lernas la anglan, ĉar ili almenaŭ havas antaŭjuĝon pri la malfacileco de la finna? Kaj ĉu tiuj finnlandanoj, kiuj devas kontaktadi kun enmigrintoj, ankaŭ pli volonte uzas la anglan, ĉar ili opinias, ke ĝi estas “internacia” lingvo? Se tiel okazas, ĝi estas domaĝe por ambaŭ flankoj: enmigrintoj restas duonlingvaj el la vidpunkto de la denaska loĝantaro kaj la fremda nacilingvo pli kaj pli fortiĝas. La problemon povus egalrajte solvi nur vere neŭtrala internacia lingvo, ĉar nacilingvo neniam estas neŭtrala – rilate al kulturo. Sed ŝajnas, ke bedaŭrinde la decidantoj devus havi multe pli da prudento kaj vastanimeco por rimarki tion.

Jukka Laaksonen

Intervjuo kun la prezidanto de la Esperanto-Ligo de Finnlandaj Instruistoj

Carola Antskog, vi nun prezidas ELFI kaj jam estas tempo, ke ni iom konu vin. Kiam kaj kial vi interesiĝis pri Esperanto kaj ek-lernis ĝin?

En 1986 mi legis en skolta gazeto interesan artikolon pri la internacia lingvo. Mi ankaŭ legis ke oni trovas kontaktulojn sub Esperanto en la telefonlibro. Ankaŭ mia filino Anna Ritamäki interesiĝis kaj ni diskutis kion fari. Finfine mi telefonis al numero en Turku kaj baldaŭ poste ni ricevis materialon pri Esperanto perpoŝte. Ni ambaŭ tre fasciniĝis pri la lingvo, ke tiom facile oni mem povas konstrui vortojn kaj frazojn. Allogis nin ankaŭ la ideoj pri internacia amikeco. La jamaj spertoj pri internaciaj kontaktoj en la skolta movado donis inspiron lerni ankaŭ la internacian lingvon.

Ĉu vi mem iam instruis la lingvon? Kie? Al kiuj?

Jes, mi preskaŭ tuj post miaj unuaj lecionoj volis pludoni tiun ĉi klaran kaj strukturitan lingvon al miaj konatuloj. Mi kolektis grupon por kuna lernado, sed mi mem estis tiam ankoraŭ tro malsperta. Post kelkaj jaroj, en la Universala Kongreso en Bergeno 1991 mi partoprenis Cseh-seminarion. Tiun sperton mi uzis kiam mi gvidis semajnfinan kurson en Iisalmi. Poste mi gvidis plurajn mallongajn kursojn, ekz. ĉi-jare kvinhoran kurson en Muurla. Ankaŭ mi organizis iujn pli longdaŭrajn kursojn kun aliaj instruistoj, ekz. kun Georgo Handzlik kaj Eva Bondar.

Miaj plej gravaj instruspertoj estas du kursoj por komencantoj en la gimnazio en Karis-Karjaa. Poste mi gvidis du el la lernantoj

en memstudado pri literaturo kaj historio de Esperanto. Mi ankaŭ gvidis 12-horan kurson por lernantoj en la 8a kaj 9a klasoj.

En la skolta tendaro Loisto 1996 mi kun kelkaj skoltinoj de Sauvo kaj Turku instruis pli ol ducent geskoltojn dum trihoraj kursetoj. Ili lernis i.a. salutvortojn, korpopartojn kaj kalkuladon ĝis dek.

Kiujn lernolibrojn vi rekomendus al komencantoj?

Estas ege malfacile rekomendi lernolibrojn. Dependegas de la situacio, kiu instruas, kiujn antaŭsciojn la gelernantoj havas k.t.p. Mi uzis "Tendaraj tagoj" de Stefan MacGill sed ankaŭ tekstojn el veraj libroj kiel la infanlibron de UNESKO "Divenu do kiun mi faras!" kaj "Muminvalo". Mi mem lernis interalie per koresponda kurso de Sveda Esperanto-Federacio kaj per aŭskultado de kasedoj dum miaj vojaĝoj al laboro. Mi memoras "Liza kaj Paŭlo", "Jen nia mondo" kaj la "Zagreba metodo".

Kaj al progresantoj?

Por homoj kiuj jam scipovas la lingvon mi rekomendas faklibrojn aŭ romanojn. Bona libro donas sciojn, vortojn kaj esprimojn. En la riĉa literaturo ĉiu leganto trovos librojn laŭ sia propra intereso.

Kio estas via propra fako?

Mi laboris kiel instruisto pri matematiko, fiziko kaj ĥemio. Mi emeritiĝis ĉi-somere.

Rakontu iom pri viaj labortaskoj antaŭ la emeritiĝo!

Krom normala instruado mi dum kelkaj jaroj laboris multe pri planado. Mi faris la

horarojn por instruistoj kaj lernantoj sed ankaŭ studplanojn por infanoj de antaŭlern-ejanoj ĝis gimnazianoj.

Kiaj estas viaj ŝatokupoj?

Skoltado estas parto de mia vivo de kiam mi 14-jara estiĝis patrolestro. Mi ankaŭ ĉiam interesiĝis pri politiko kaj estas prezidanto de la delegitaro pri edukado en mia komunumo Kimito-Kemiö.

Kio laŭ vi estas la rolo de ELFI en nialanda E-movado?

ELFI estu la natura asocio por personoj kiuj instruas Esperanton kaj por ĉiuj kiuj interesiĝas pri la vivo en niaj lernejoj. Estas en ordo ke EAF petas konsilojn de ELFI pri lernolibroj, kursoj k.t.p. Bedaŭrinde ELFI ne estas sufiĉe forta por tuj doni tiujn konsilojn. Ni do devas kaj havi pli da membroj kaj lerni pli pri lernado.

Kion E-o povus doni al Finnlandaj lernejoj kaj ties anoj?

Internacieco estas honorvorto en la nuna instruplano por lernejoj en Finnlando. Per Esperanto oni povas ĝui pli vastan internaciecon ol per iu ajn alia lingvo.

Ĉu vi havas planojn pri kiuj vi ŝatus sciigini?

La ELFI-estraro dum sia kunsido en Valamo decidis prilabori la statutojn por ke pli da homoj trovu membrecon inda. Ni ankaŭ decidis lerni pli pri ekzistanta lernomaterialo kaj trakti la eblecojn sendi grupon el Finnlando al la EU-kunsido Euroscola en Strasburgo. Pri ambaŭ planoj estas pli da informoj en alia loko de la gazeto.

Dankon! Kaj sukceson!

Intervjuis Saliko

BET-37

Inter la Baltiaj landoj Estonio estas la plej bone konata al la finna popolo. Ankaŭ mi neniam vojaĝis en Latvio kaj Litovio. Por konatiĝi ankaŭ kun la laste nomitaj du landoj mi decidis partopreni Baltajn Esperanto-Tagojn en Kaunaso, Litovio dum la tempo 6-15.9.2001. La vojaĝo estis sukcesa. Mi tiel vojaĝis, ke mi vidis multajn urbojn sed ankaŭ kamparajn regionojn. Pri la esperanta okazo mi ne multon atendis. Mi neniam partoprenis similajn tagojn. Tial mi estis gaje surprizita pro la altnivela programo de la tagoj. Mi aŭskultis multajn interesajn prelegojn, partoprenis studojn de la lingvo kaj ĝuis pri la ampleksa kultura programo. Multaj organizitaj ekskursoj kaj amikaj diskutoj kompletigis la interesan programon.

Antaŭ ol mi vojaĝis, la sekretarino de la organiza komitato Rita Valčiukaite retroŝte sendis informon pri la tagoj por mi. Tial mi havis iaspecan ideon pri la tagoj kaj pri la lokaj kondiĉoj. Mi tute sole vojaĝis. Mi ne sciis ĉu iu alia persono el Finnlando partoprenos la tagojn. Tial estis granda surprizo por mi, ke multaj finnaj samideanoj alvenis samtempe kun mi al la registara tablo. Entute partoprenis dektri finnoj kaj krome la finn-naskita esperantistino Soile Lingman el Svedio, kiun oni jam dum la milito kiel malgranda filino sendis al Svedio.

Mi vojaĝis aŭtobuse de Turku al Helsinko kaj kun rapida ŝipo al Tallinno, daŭre nokte al Vilniuso, kien la aŭtobuso alvenis je la naŭa horo matene. Tie mi promenis en la malnova urboparto kaj alie. Estis iu nacia festotago kaj la tuta urbo estis kvazaŭ fermita. Poste dum la sama tago mi vojaĝis la lastajn cent kilometrojn al Kaunaso kaj Noreikiskes, dek kilometrojn ekster Kaunaso. En Noreikiskes situas la granda agrikultura universitato, la loko de la ĉi-jaraj esperantotagoj. La universitato havas signifan historion kaj ĝi estas vere impresa instituto kun

la ampleksa areo kaj kun multaj grandaj domoj por administrado, instruado, loĝado ktp. La kvanto de la studentoj varias inter 3000-4000. Unu el la esperantistoj, kiu mem iam estis studinta en la universitato, rakontis por mi pri la aktualaj kondiĉoj de la universitato. Mi loĝis en la hotelo de la universitato kaj manĝis en la studenta manĝejo.

La programo de la tagoj funkciis en la ĉefa domo de la universitato, en la prelegĉambroj kaj en la granda salono. La informadon helpis bone redaktita informilo, BETago, kiu aperis okfoje. En la unua numero la nepo de Ludoviko Z., L.C. Zaleski-Zamenhof salutis la tagojn dezirante sukceson al la organizantoj kaj al la partoprenantoj. Ankaŭ la Litova ŝtatprezidento Valdas Adamkus sendis sian salutmesaĝon. La informo de la BETago estis ĉefe oficiala sed ankaŭ dis-

tra, kiel rakontas sekva ekzempla ŝerco: ”– Kio okazis, Andreo? – Pro mia bopatrino mi havas multajn problemojn. – Trankviliĝu. Ni ĉiuj havas problemojn pro ili. – Jes. Tamen ili ne ĉiuj gravediĝas.”

Pro la multaj samtempaj prelegoj kaj aliaj okazoj oni devis elekti laŭ la propra intereso. Mi ĉi-sekve rakontas ion pri la prelegoj, kiujn mi aŭskultis. P. Ĉeliauskas prelegis pri la litova lingvo kaj pri la litova literaturo. Li rakontis i.a., ke la litova lingvo estas unu el la plej maljunaj lingvoj de Eŭropo kaj ke ĝi devenas de la sanskrito. J.Parzyszek (Pollando) interese parolis pri ekonomio, teorie kaj praktike. Li nuntempe havas ege kritikan sintenon je la Esperanto. Inter alie li nun asertis, ke li lernis la anglan lingvon preskaŭ similtfacile ol la esperantan lingvon. Tion mi tute ne kredas, sed mi ne povas kontraŭi



Dahlia Pileckiene (maldekstre) zorgis pri loĝado kaj manĝado, kaj Rita Valčiukaite estis sekretarino de la organiza komitato de BET-37. (Fotoj: Bruno Lehtinen)

lian duan aserton, ke Esperanto almenaŭ nuntempe estas malutila kiel komerca lingvo. Tamen li diris, ke Esperanto multon donis por li dum la dudek jarojn, kiam li estis aktiva kaj laboris en la esperanta movado.

Mi aŭskultis eĉ du prelegojn de Moisse/Mihailo Bronstein. Li ja estas konata rusa-esperanta poeto kaj muzikisto. Li prelegis pri Josif Brodski – poeto de la jarcento kaj pri A. Puŝkin – vivo, poezio, tradukoj. Li prezentis tradukojn de la poemoj kaj de Brodski kaj de Puŝkin. En la granda salono li kantis kaj ludis gitaron por la granda publiko. Oni eblis aĉeti en la libroservo la librojn, kiuj estis esperantigitaj de Bronstein.

Stranga estis la prelego de V. Batijevski (Belorusio): Mineralo ŝungito por la sano. Li havis la materialon, ŝungiton, kune kun la diversaj instrumentoj sur la tablo. Li rakontis pri la saniga efekto de la ŝungito, sed mi kuraĝas dubi la

efekton. Neniam mi aŭdis aŭ legis pri ŝungito. Batijevski tamen estis tute certa pri la multspece bonfariga efekto de la materio.

Mi aŭskultis plu unu aŭ du aliajn prelegojn pri kiuj mi ne multon memoras kaj estis multaj prelegoj, kiujn mi volis aŭskulti sed bedaŭrinde ne sukcesis. En la vivo oni ĉiam devas elekti kaj fari decidojn, bonajn aŭ nebonajn. Ĉiuokaze mi decidis partopreni la tuttagan ekskurson al la suda Litovio. Estis granda amaso de la ekskursantoj, du plenaj aŭtobusoj. Oni tiel deklamis la ekskurson: ”...muĝas la plej grandaj pinaroj, fluas ĉarmaj riveroj kaj ankaŭ la patro de la litovaj riveroj – NEMUNAS. Dum la ekskurso ni vizitos unikan parkon de sovetaĵoj (renversitaj idoloj). En la parko vi povos eksenti etoson de GULAGaj koncentrejoj ankaŭ manĝeti en manĝejo de soveta tempo. En kuraĉloko Druskininkai ni enŝipiĝos kaj navigos laŭ Nemunas ... En Liŝkiava ni elĉipiĝos kaj surgrim-



Finnaj esperantistinoj en BET-37, kaj litova esperantisto Bonifacas Kasperionas.

Domoj de la kongreseja universitato.

pos kastel-monteton... Poste ni atingos urbeton Veisiejai, kie en 1885 loĝis L.Zamenhof, kaj kie dum BET-34 estis inaŭgurita monumento al la aŭtoro de Esperanto.”

Suda Litovio vere estas naturbela kun multaj malgrandaj lagoj. La vetero ankaŭ estis plej bona dum la ekskurso kaj dum la tuta

semajno. Soveta parko estis impresa. Tion mi povas rekomendi por iu ajn. Tie en la vasta arbarparko nun sidas aŭ staras skulptaĵoj de la herooj de la litova socialisma periodo. Sic transit gloria mundi.

Pri la kultura programo mi povas precipe menci la koncerton de la ĉambra orkestro de Kaunas. La orkestro, gvidata de Pavel Berman, post la solena malfermo majstre ludis Seksteton por kordaj instrumentoj de P.I.Ĉajkovskij (Souvenir de Florens), Opus 40, kvar partoj. Pavel Berman estas internacie renoma violonisto. Li iĝis la direktoro de la orkestro en la jaro 1997. Ankaŭ la blovorkestro de Kaunas ludis dimanĉvespere antaŭ la centra domo. Repertuaro de orkestro estis varia: prezentado kun koreografia grupo de knabinoj, estrada kaj popola muziko, klasika kaj preĝeja muziko. La orkestro estas konata en multaj landoj i.a. en Finnlando, ludante en festivaloj k.t.p. Ĉiu vespere en la granda salono oni povis ĝui pri altnivelaj programoj. Interkonan vesperon oni ankaŭ aranĝis kaj post la solena fermo oni dancis ĝis la malfrua nokto, eĉ mi dancis kun mia malsana genuo, kiu post la intensa dancado estis preskaŭ sana. Kia miraklo.

En la sekvonta jaro Riga, la ĉefurbo de Latvio organizos la Baltajn Esperanto-Tagojn. Hejm-



veninte mi haltis en Riga kaj mi nun povas diri, ke Riga estas belega urbo, maljuna Hansa-urbo, kiu havas pompan maljunan urboparton. Belaj urboj estas ankaŭ Kaunas kaj Vilniuso, kiujn mi pli konatiĝis dum ĉi-tiu vojaĝo. Entute mi povas konstati, ke mi nun estas multe pli informita pri la ŝtatoj Litovio kaj Latvio ol antaŭ la vojaĝo. Mi estas gaja kaj kontenta, ke mi faris la vojaĝon.

En Turku la 21-an de aŭgusto 2001.

Bruno Lehtinen

Statistiko

Partoprenantoj registriĝis el 19 landoj: Anglio, Aŭstralio, Belorusio, Brazilo, Britio, Ĉeĥio, Danio, Estonio, Finnlando, Germanio, Hispanio, Italio, Latvio, Litovio, Norvegio, Pollando, Rusio, Svedio, Ukrainio, entute 301 partoprenantoj. Anticipaj aliĝintoj estis pli multaj, ne venis 23.

El Finnlando 13 aliĝis kaj ĉiuj ĉe-estis; Autio Alli Maikki, Lehtinen Bruno, Liimatainen Kaija, Liste Jorma, Mäkitalo Mikko, Mannila Seija, Miettinen Irja, Muurainen-Särkkä Katriina, Parpala Marjaliisa, Saastamoinen Kaisa ja Markku ja Miamaria, Vuopala Aira.

La Komitato de UEA elektis novan Estraron

La Komitato de Universala Esperanto-Asocio elektis novan estraron por la periodo 2001-2004 en Zagrebo. La elekto okazis dum la unua tago de la kunveno, en la sabato antaŭ la malfermo de la kongreso. La Komitato sekvis la proponon de la Elekta Komisiono (s-ro Roland Lindblom, Svedujo, s-ino Claude Nourmont, Francujo kaj s-ino SYŌZI Keiko, Japanujo) nomumita de la Komitato en Berlino 1999. Pliaj proponoj ne prezentiĝis.

Al la plej multaj membroj kaj eventuale ankaŭ al la plej multaj komitatanoj ne estis konate kiel prezenti kandidatigojn. Minimume du Komitatanoj el diversaj landoj povas prezenti kandidatojn al la Elekto Komisiono antaŭ la 31-a de marto de la koncerna elektojaro. Komitatanoj povas ankaŭ atentante al pliaj postuloj prezenti kandidatojn post tiu dato aŭ dum la daŭro de la kunveno. Por membroj kiuj volas proponi kandidaton estas konsilinde kontakti konatan komitatano de UEA, ekz. sian landan aŭ fakan reprezentanton (komitatano A), rekte elektitan komitatano reprezentantan la Individuajn Membrojn (komitatano B) aŭ komitatano aldone elektitan de la komitatanoj A kaj B (komitatano C). La situacion komplikas ankaŭ ke la nova Komitato ekoficas je la malfermiĝo de la komitatokunsido. Sekve nur komitatanoj de la antaŭa trijara periodo rajtas formale proponi kandidatojn antaŭ la kunveno. La Elekta Komisiono tamen strebas al pragmatika aliro.

La procedurajn problemojn superas la influo de la fakto ke la estraraj postenoj ne estas perceptataj allogaj. Estrara laboro signifas malmultan gloron kaj komforton, sed multan laboron kaj principe tre grandan respondecon. La nova prezidanto, en la antaŭa estraro vicprezidanto, s-ro Renato Corsetti, plurfoje atentigis pri tio ke li ne havis la deziron prezidantiĝi, ke li tion faris ĉar oni ne sukcesis konvinki iun alian. Supoz-

eble li aludis al la jam dufoja prezidinto de UEA s-ro Humphrey Tonkin, kiu ĉi-foje pretis kandidati kiel vicprezidanto, ne kiel prezidanto. La situacion la nova prezidanto en sia ferma parolado esprimis jene: "En la elekta ludo, mi malgajnis, kaj pro tio oni elektis min prezidanto de UEA. Tio ne sonu kiel malkoheraĵo. Efektive en la Esperanto-movado je ĉiuj niveloj elektoj estas kiel tiuj kart-ludoj, en kiuj gajnas tiu, kiu sukcesas malgajni, aplikante tamen ĉiujn regulojn de la normala ludo."

La oficialaj rezultoj estas prezentitaj sube. La blankaj voĉoj verŝajne aperis pro nekomprene de la uzita proceduro. La poraj, kontraŭaj kaj sindetenaj voĉoj estas eksplicitaj; ĉiu komitatano devis ĉe ĉiu unuopa nomo de kandidato skribi unu de tiuj tri vortoj.

Prezidanto:

S-ro **Renato Corsetti**, Italujo (45 por, 1 kontraŭ, 1 sindeteno)

Vicprezidantoj:

S-ro **LEE Chong**, Koreujo (43 por, 2 kontraŭ, 2 sindetenoj)

S-ro **Humphrey Tonkin**, Usono (46 por, neniuj kontraŭ, 1 sindeteno)

Ĝenerala sekretario:

S-ro **Ivo Osibov**, Kroatujo (39 por, 6 kontraŭ, 1 sindeteno, 1 blanka)

Estraranoj:

S-ino **Ans Bakker-Ten Hagen**, Nederlando (43 por, 2 kontraŭ, 3 sindetenoj, 2 blankaj)

S-ro **GBEGLO Koffi**, Togolando (40 por, 2 kontraŭ, 3 sindetenoj, 2 blankaj)

S-ro **Andrej Grigorievskij**, Rusujo (41 por, 2 kontraŭ, 2 sindetenoj, 2 blankaj)

S-ino **Michela Lipari**, Italujo (35 por, 7 kontraŭ, 3 sindetenoj, 2 blankaj)

Anna Ritamäki

UEA-komitatano A por EAF 2001-2004

La tri gvidantaj oficistoj de UEA decidis forlasi la oficejon

Dum la Universala Kongreso en Zagrebo la tri gvidaj oficistoj de UEA, la ĝenerala direktoro de UEA Osmo Buller, la direktoro de la Centra Oficejo Pasquale Zapelli kaj la redaktoro de la Revuo Esperanto Istvan Ertl anoncis siajn decid-ojn forlasi siajn postenojn. Dum sia merkreda kunsido la nova Estraro devis alfronti la decid-ojn de la du direktoroj. La redaktoro informis pri sia intenco al la Estraro vendrede. Ĉiuj planas resti en la oficejo ĝis la sekva jaro por povi transdoni siajn spertojn al siaj sekvantoj.

La Komitato estis informita formale dum sia vendreda kunsido pri la demisioj de la direktoroj.

Sub la lasta punkto de la tagordo “Ceteraĵoj” la Ĝenerala Direktoro faris adiaŭan paroladon. Li alvokis la komitatanojn subteni la novan Estraron kaj ne piki ilin en la dorson, sed puŝi ilin antaŭen. Li petis ĉiujn ankaŭ apogi la Centran Oficejon, ankaŭ tiujn kiuj sekvos en la ontaj jaroj. “Tio kion la oficistoj multe bezonas estas ĝuste la konstanta subteno de la Estraro aparte kaj ankaŭ de la Komitato, ĉar tio estas la plej granda forto kiun ili povas ĝui.” Li ankaŭ informis la Komitaton pri la intenco de la direktoro de la Centra Oficejo forlasi sian laboron. Jene li finis sian paroladon:

”Esperanto estas serioza afero, kiun ni klopodas antaŭenigi; ĝi ne estas por satigi kaj kontentigi viajn proprajn personajn celojn. Esperanto estas serioza afero, UEA ankaŭ kaj tiu estu la linio de la nova Estraro kaj de ni ĉiuj.”

La prezidanto de UEA Renato Corsetti dankis al Osmo Buller pro liaj 5 jaroj kiel direktoro de la CO kaj 6 jaroj kiel ĝenerala direktoro. Li aparte menciis lian kontribuon al la financa stabiligo de UEA.

En la fermo de la kongreso sabate la ĝenerala direktoro estis dankita per fortaj aplaŭdoj. La estraranino pri financoj Ans Bakker-Ten Hagen

prezentis la dankvortojn de la Estraro.

La politike kaj strukture gravan signifon de la demisioj montras la fakto ke por la koncernaj tri postenoj la Estraro elektas la oficistojn. Ĉiuj ceteraj oficistoj povas esti administre elektitaj. Plentempe en la CO laboras 10 oficistoj.

Anna Ritamäki

UEA-komitatano A por EAF 2001-2004



Osmo Buller.



Pasquale Zapelli.




Istvan Ertl.

Aktive en la lingva reto

Mi ricevis eblecon kunesti en la projekto *Aktive en la lingva reto* (finne: Aktiivisesti kieli-verkossa), kiu ĉelas al novtipaj lingvokursoj en laboristaj kaj civitanaj institutoj en Turku-regiono. Esperanto-kurso realiĝas en la civitana instituto Aurala en Turku.

La novtipa lingvokurso estas kunigo de du lernometodoj, finne temas pri 'etä- ja lähiopetuksen yhdistäminen' (kunigo de malproksima kaj proksima lernado). Duono de la kurso okazas en klasĉambro kaj duono hejme pere de komputilo. Hejme la gelernantoj faras la taskojn donatajn de la instruisto, serĉas pliajn tekstojn kaj informojn de la reto, diskutas en propra retdiskutejo ktp. Kompreneble la gelernantoj devas havi eblecon uzi komputilon kaj ankaŭ scipovi ĝian bazan uzon. La klasĉambra leciono estas pli ordinara kaj ĉelas plejparte al plibonigo de prononcado kaj parolado.

La aliaj lingvoj en la projekto estas la angla (5), hispana (3), finna (2), germana kaj rusa. Ni instruistoj en la grupo (ohjausryhmä) de la projekto ĉiuj jam en la printempo preparis kursojn, kiuj konsistas el la menciitaj elementoj. En la instruista grupo estis eĉ pli da lingvoj, i.a. la hungara kaj la sveda, sed ĉiuj ne povis realiĝi. Fine de majo oni decidis, kiuj kursoj realiĝus kaj esperanto estis elektita inter la menciitaj aliaj lingvoj. En aŭgusto komenciĝis reklamado de la kursoj kaj en la informgazetetoj de la instituto kaj en la reto. Esperanto estis elektita kiel



kurso, kiun oni reklamis en ĉiuj institutoj.

Ni instruistoj diskutas la kursojn en la reto. La lernejoj de Turku havas retstudejon Portti (finne: Portti-oppimisympäristö), kien ni ĉiuj sendos niajn kursoplanojn kaj kie aliaj povas vidi ilin.

Krome ni havas propran retdiskutejon kaj retpoŝton ĉiuj por interŝanĝi opiniojn.

La unua kursofojo de la esperantokurso estis merkredon la 5-an de septembro 2001. Venis bedaŭrinde tro malmulte da gelernantoj, kvankam la minimumo estis nur 6. Sed ni komencis kaj esperas, ke en du semajnoj ni trovos la mankantajn du personojn por daŭrigi la kurson en Aurala instituto. Ĉiukaze mi instruos tiujn aktivulojn tra nia societo. Ĉiuj, kiuj venis, estis personoj, kiuj jam sciis ion pri esperanto kaj jam studis ĝin pli frue. Do, alia bedaŭra afero kun la eksperimento estas, ke ĝi ne sukcesis allogi tute novajn homojn al studado.

La adreso de la kursoj estas <http://www.tkukoulu.fi/~tsuto/tsuto/kieliverkko.htm>. Vi, kiuj havas eblecon viziti la reton, rigardu ĝin. Krome ni kursanoj havas en nia uzo diskutejon nomita UBB.

La simbolo de la kursoj estas floro de lingvo kaj meze estas Esperanto!

Se la kurso daŭros, mi raportos en Esperantolehti. Tiam mi devos ankaŭ skribi kursoraporton kaj raportojn detale pri la kurso-evento en la instruista grupo.

Tiina Oittinen, Turku

Euroscola-en-Esperanto – Finnlandaj gelernantoj serĉataj!!

Somere pasintjare kelkaj aktivuloj ekagis por realigi la revon ke aŭdiĝu esperantaj voĉoj en la Europunia Parlamentejo. Temis pri tre konkreta projekto, pri Euroscola-en-Esperanto, pri venigo de esperanteparolantaj gelernantoj de diversaj eŭropaj landoj al Strasburgo. Tiu revo ankaŭ realiĝis. Inter la gejunuloj kiuj partoprenis la programon Euroscola la 8an de majo estis grupo de esperantistoj el Francio, Italio, Svedio kaj el kvar kandidatoŝtatoj.

Euroscola estas evento por gejunuloj 16-ĝis 18-jaraj, kiuj dum unu tago en la parlamentejo de EU en Strasburgo pritraktas iun gravan temon. Ĉi-jare la junaj ludparlamentanoj diskutis pri lingvoj kaj tiel partopreno de esperantistoj estis bone motivita.

EU ne aranĝis la deziratan samtempan tradukon de esperanto, sed tio montriĝis eĉ avantaĝo. Dum la aliaj lingvoj estis parolataj multaj aŭskultis la interpretistojn sed kiam la esperantaj delegitoj parolis ĉiuj aŭdis la originalan paroladon. Poste franca partoprenanto tradukis en la francan, de kiu estis tradukado en aliajn lingvojn.

Tiu unua sperto estis sukcesa kaj imitinda. Nun ni ĉiuj kune laboras por ke Euroscola-en-Esperanto estu ĉiujara evento. Jam anon-

ciĝis grupoj el Francio, Kroatio kaj Pollando. Esperanto-Ligo de Finnlandaj Instruistoj ambicias ke ankaŭ Finnlando havu siajn esperantajn eŭropdeputitojn sekvajare. La vojaĝojn de la partoprenantoj pagas la Eŭropa Parlamento.

Ĉu jam estas interesitaj gejunuloj 15-17-jaraj? Informu la prezidanton de ELFI, tel (050) 581 7272 aŭ retroŝto <cantskog@kolumbus.fi>. ELFI aranĝas semajnfinan kurson 2-4 novembro por gelernantoj kiuj volas lerni esperanton cele al partopreno en Euroscola. La loko estas Källkullen en Kimito-Kemiö. Ni ofertos ankaŭ du pliajn preparajn semajnfinojn sekvajare antaŭ la vojaĝo al Strasburgo. La unua semajnfino kostas 250 mk (inkluzive de studmaterialo, loĝado kaj manĝado). Ni strebas trovi financadon por la postaj partoj. Limdato por aliĝoj: 26 oktobro 2001.

Ni jam kontaktis kelkajn gimnaziojn, kiuj pozitive rilatis al akcepto de la trisemajnfina kurso kiel 36-hora gimnazia kurso. Pliaj informoj ankaŭ ĉe la retejo: <<http://e.euroscola.free.fr>>.

*Carola Antskog
Prezidanto de ELFI*

Korespondi deziras

Mi estas 22-jara fraŭlino kaj estas lernanta pri kombista fako. Mi eklernis E-on en Eburra Bordo kaj nuntempe loĝas en Togolando. Mia nomo estas: ASSOU AVOSSE Cecilia Affi. Mi deziras korespondi pri ĉiuj temoj,

precipe por plibonigi mian Esperanton.

Mia adreso estas: ASSOU AVOSSE Affi Cecilia, BP. 13169, Lomé, Togo (Ouest Afrique). Mi estas ankaŭ kontaktebla ĉe <koffidoumignon@hotmail.com>.

Intervjuo kun Petro

Iam en aŭgusto sonis la telefono. "Post 3 tagoj mi venos," diris junula voĉo en Esperanto. "Mi biciklos de Rovaniemi." Kaj alivespere la sama voĉo sciigas, ke la parolanto estas ankoraŭ 50 km de nia hejmo, ĉar pluv-egoj malrapidigis lian bicikladon, kaj jam malheliĝas. Kion fari do? Oni rendezuas ie sur la vojo apud Haapajärvi, kaj ek per la aŭto por hejmenigi la malsekulon.

Post dutaga kunvivado mi petas intervjuon.



Petro, vi jam la duan fojon biciklas en Finnlando. Kial tiom ofte?

– Al mi plaĉas viaj bonaj vojoj, la silento. Ne granda estas la trafiko. Mi rajtas starigi tendon kie ajn. La homoj estas simpatiaj, ili akceptas tendon en ĝardeno, invitas al sia domo. Mi ne timas banditojn. Mi dormas trankvile, kaj junie-julie la noktoj estas helaj.

Kiom da kilometroj vi jam biciklis?

– 2500 ĉi somere.

Petro montras libreton, kies paĝojn li plenigis per datoj, kilometroj kaj lokoj, adresoj kaj telefonnumeroj.

Ĉu via biciklo bone servis al vi?

– Ĉi-jare jes, ĉar mi riparis ĝin en Pollando, sed lastajare mi havis problemojn. Ekzemple dufoje krevis la pneŭa bendo, neniu riparejo troveblis. Feliĉe mi sukcesis petveturi al Helsinki, rekte el la arbaro orient-Finnlanda, sen prokrasto. En Finnlando la riparoj multe kostus.

Kion vi manĝas dum viaj longaj bicikladoj?

– Mi jam lernis elekti malmultekostajn kaj energioplajn manĝaĵojn, munkki kaj jogurtti, ekzemple.

Surprize, Petro miksas en sian Esperanton kelkajn finnajn vortojn, kiujn li prononcas klare kaj bele.

Ĉu vi estas studento?

– Jes, mi studas hungaran lingvon, ankaŭ iom da finna kaj mi interesiĝas pri turismo.

Kial kaj kiel vi lernis Esperanton?

– Mia patrino multe parolis en Esperanto kun la gastoj, kiuj vizitadis nin en la komu-



Petro kun Matti Pyhälä en kafejo en Pietarsaari.

nisma tempo. Mi lernis facile, nur sidante inter ili kaj aŭskultante. Mi neniam studis Esperanton. Esperanto utilas al mi, ĉar mi povas uzi Pasportan Servon, sed mi ne okupiĝas pri E-to dum la vintro, kiam mi studas kaj laboras. Fakte, mi povus senfine reklami Pasportan Servon. Mi ŝatus bicikli ankaŭ en Brazilo.

Pri Finnlando vi diris nur laŭdojn. Ĉu vi ne ŝatus aldoni ion alian?

– Jes ja, pri la saŭnoj! Kiam mi venas al iu finna esperantisto, ili ĉiam unue proponas, ke mi iru en la saŭnon. Tamen mi ne eltenas la saŭnan varmegon. Mi sentas, ke ĝi ne al mi bonas, kaj ankaŭ kuracisto avertis, ke mi ne tro saŭnumu, pro sangopremo. Kaj

iam en iu tre dise loĝata parto de Finnlando mi renkontis urson sur la vojo. Unue mi pensis ke estas nur ŝtonego, sed fakte staris urso je la distanco de 300 metroj de mi.

Kiam Petro estas jam forironta, mi demandas, kien li nun biciklos.

– Al Jyväskylä, al gastemaj homoj, al aliaj landoj, Pollando. Kaj li levas siajn selo-sakojn, mapon, trinkaĵobotelon kaj aliajn pakojn sur la biciklon. Amika manpremo. Adiaŭ! La suno brilu, sed ne tro varme! Atingu vian celon antaŭ la sunsubiro!

La polan nomon de Petro kaj lia patrino vi trovos en Pasporta Servo ĉe Pollando, Walbrzych.

Saliko

El esperantostudio: JoMo leĝere sen Liberecanoj

En sia nova kd JoMo prezentas pecojn aŭditajn en liaj solokonzertoj dum variaj aranĝoj. Ekzakte ĉi disko estas – denove – majlkolono por eo-muziko ĉar ĝi estas precize la unua frukto el

memkonstruita studio de Floréal Martorell, ĉefo de Vinilkosmo-eldonejo. La sono de la studio, starigita en Tuluzo, tute nemalbonas, do la morgaŭo brilas por la muziko!

Sub la malpli alloga eksteraĵo de *JoMo Friponas* sin kaŝas tre simpatiaj muzikaĵoj. Kun granda nombro da amikoj JoMo pre-



zentas vivetose proprajn kaj popolkantecajn sudlandajn pop-pecojn el la 50-60-aj jaroj: Ĵambalajo, Besame Mucho (Kisu min), Do You Wanna Dance (Ĉu vi volas danci?), eĉ tute novan esperantigitan version pri La Bambo (vd.p.25). Eble la listo surprizas per sia mal-surprizeco, sed la unika naj-

tingala voĉo, hispana akcento (kaj kante kaj lude) kun sprita distremo faras JoMo-n la ĝusta persono por re-registri ĉi oldajn pecetojn. Entute *JoMo Friponas* estas bonhumora disko kun klaraj amuzaj tekstoj pri esperanta vivo kaj nostalgio el lontanaj landoj. Bona por retrovi festivalan etoson!

Patrik Austin

Aŭstria Esperanto-Movado ofertas:

AT 1050 Wien, Margaretengürtel 100/11/2

Aktoj	249 paĝoj	104,- FIM
--------------	-----------	-----------

Multaj prelegoj faritaj en la Universitato de Vieno de famaj aŭtoroj kiel Piron, Frank, Maitzen, Tonkin ktp. pri Esperanto.

Wien	48 paĝoj	45,- FIM
-------------	----------	----------

Gvidlibro de la bela urbo Vieno. Kolore ilustrita, en la lingvoj Esperanto, angla kaj germana.

Distra	128 paĝoj	24,- FIM
---------------	-----------	----------

Koktelo

Humuraj parte ilustritaj kontribuaĵoj. 2-a eldono.

Pri la pagmaniero ni informos vin per nia fakturo. Petu nian katalogon!

Internacia fotokonkurso

Post la sukcesaj konkursoj en 1998, 1999 kaj 2000 la redakcio de "La Ondo de Esperanto" invitas al partopreno en la kvara Internacia Foto-konkurso.

La konkurso ne estas ligita al deviga temo.

En la konkurso rajtas partopreni ĉiu deziranta fotemulo amatora aŭ profesia, sendepende de la loĝlando kaj lingvokono. Unu persono rajtas partopreni per maksimume kvin fotoj. La minimuma formato estas 10 x 15 cm. Fotoj povas esti koloraj aŭ nigra-blankaj, vertikalaj, horizontalaj kaj aliformataj. Fotoj senditaj komputil-rete ne estas akceptataj.

La konkursajn fotojn bonvolu sendi unuekzemplere al "La Ondo de Esperanto" (RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1248, Ruslando). La fotoj devos atingi la indikitan adreson antaŭ la 15a de decembro 2001.

La konkursaĵoj devas esti subskribitaj per pseŭdonimo. En aparta koverto kunsendata devas esti enmetita slipo kun la pseŭdonimo, aŭtenta nomo kaj poŝta adreso de la aŭtoro. Oni povas aldoni titolon aŭ klarigan noton al la fotoj, sed tio ne estas deviga.

En la konkurso ne rajtas partopreni fotoj, kiuj jam estis premiitaj aŭ publikigitaj. Tripersona juĝkomisiono aljuĝos premiojn al la laŭreatoj:

1a premio: du minimumaj ruslandaj monataj salajroj kaj abono al "La Ondo de Esperanto"

2a premio: unu minimuma ruslanda monata salajro kaj abono al "La Ondo de Esperanto"

3a premio: abono al "La Ondo de Esperanto"

Specialan premion (libroj de "Sezonoj" kontraŭ ekvivalento de unu minimuma ruslanda salajro) ricevos la plej bona foto teme ligita kun Esperanto.

Ĉiu premiito ricevos diplomon.

La organizantoj rezervas al si la rajton ĝis la 31a de decembro 2003 aperigi la ricevitaĵojn en paperaj kaj elektronikaj eldonaĵoj kaj en ekspozicioj.

La reta "El Popola Ĉinio"

La reta "El Popola Ĉinio" naskiĝis en la fino de 2000. Ĝi servas tiujn, kiuj amas Esperanton kaj pacon kaj deziras koni Ĉinion.

La reta EPĈ havas 12 partojn, t.e. Novaĵoj, Socioj, Kulturo, Esperanto, Inter Ni, Homaro kaj Naturo, Turismo, Ekonomio, Arto, Scienco kaj Eduko, Kuirarto, Sur Nia Libroreto, kun 45 rubrikoj entute. Krome, estas ankaŭ specialaj raportoj pri interesaj temoj. Ĝi estas legebla per la retejoj: <www.espero.com.cn>, <www.china-report.com.cn> kaj <www.china.org.cn/world>.

Estas ĉiam bonvenaj viaj kontribuadoj, proponoj kaj sugestoj pri la enhavo, paĝaranĝo kaj lingvaĵo de la reta EPĈ. Kontaktigu kun: El Popola Ĉinio, P.O. Kesto 77, CN-100037 Beijing, Ĉinio; retpoŝto: <epc@china-report.com> aŭ <elpc@china.com>.

novajlisto uea-membroj

Konatiĝu kun Colmar

Konatiĝu kun nord-franca urbo Colmar kiu havas neoficialan hejmpaĝon en multaj lingvoj, ankaŭ en Esperanto kaj la finna! Rigardu <<http://colmar1.free.fr>>. Post "colmar" la signo estas la cifero 1, ne litero l! Ne nur finnoj ĝojas pro julaj lumoj.

Kunlaboris <raitapy@jymy.kase.fi> kun *Jean Francois Scwaigez*, <jfjs@waika9.com>

Esperantologia fakultato en KCE

La Kultura Konsilio de KCE aprobis la projekton de Esperantologia Fakultato, ellaboritan surbaze de propono de d-ro Giorgio Silfer. La projekto iros al la Asembleo de Kultura Centro Esperantista por la definitiva aprobo, kiu antaŭvidas aplikon ekde 2003 aŭ 2004.

La Esperantologia Fakultato de KCE estos malgranda privata universitato, kiu zorgos pri la evoluigo de esperantologio ĉiudirekten: E-beletristiko, historio kaj sociologio de Esperantio, (inter)lingvistiko, komunikosciencoj kaj meto-

diko aplikitaj al Eo. Ĝi estos strukturita laŭ katedroj (de tri ĝis kvin), kun profesoroj nomumitaj inter esperantologoj rajtaj instrui en universitato; sub la kunordigo de rektoro, ili povos peti la helpon de fakuloj (nomataj docentoj) sen specifaj akademiaj rajtoj (ekz. valoraj verkistoj aŭ pedagogoj).

La Esperantologia Fakultato devos produkti ne nur kursojn, sed ankaŭ tekstojn universitat-nivelajn. Tiurilate ĝi signifos la plej altan investon interne al Esperantio por la ĉiudirekta progreso de esperantologio.

Heroldo komunikas n-ro 131

Printempa Semajno Internacia 29.3-5.4.2002

PSI estas internacia renkontiĝo por la tuta familio. Ĉi-jara temo estas “multaj kulturoj – unu ideo, multaj ideoj – unu kulturo”. Por la 18a PSI oni atendas pli ol 160 partoprenantojn el pli ol 15 landoj, el kiuj minimume triono estos infanoj diversaĝaj. Kaj komencantoj kaj flue parolantoj havos sian programon. La programo enhavas kaj laborajn kaj distrajn elementojn. Por gejunuloj inter 10 kaj 16 jaroj okazos samtempe kaj samloke Printempa Lernejo Internacia, kun apartaj kursoj pri kaj en Esperanto.

La ĉi-foja PSI-ejo estas katolika edukejo ”Ma-

ria Rosenberg” de la diocezo Speyer, en Wald-fischbach–Burgalben, sudokcidenta Germanio. Kotizoj varias per aĝo, inter 55-270 eŭroj (simpla ĉambro) kaj 70-290 eŭroj (luksa ĉambro). Por pliaj informoj kontaktu: Germana Esperanto-Asocio, Wolfgang Bohr, Johannes-Kirschweng-Str. 11, D-53474 Bad Neuenahr–Ahrweiler, tel. +49-(0)2641-4885, fakso: +49-(0)2641-9786-66, rete: <psi@esperanto.de>, <http://www.esperanto.de/psi>.

Literaturon studi telematike

Startis la ĉi-jara perkoresponda kurso de Kultura Centro Esperantista pri la esperanto-literaturo, sub la gvido de d-ro Giorgio Silfer.

La kurso okazas unuafoje tute per retroŝto. La partoprenantoj (sinjorinoj el kvin landoj: Finnlando, Francio, Hungario, Japanio, Svislando) ricevadas la lecionojn, ilin studas, taskojn plenumas. Ekzercoj, demandoj, komentarioj, klarigoj atingas ĉiujn samtempe. Tial la kurso disvolviĝas preskaŭ ĉiutage.

Referencaj tekstoj estas precipe “Enkonduko al literatura kritiko” de Silfer, “Esperanta Antologio” de Auld kaj “La 33 rakontoj” de Rossetti-Szilágyi. La kurso daŭros ĝis somero 2002.

Heroldo komunikas n-ro 132



El la reklamo de Alepa/Helsingin Sanomat 14.9.

Kasisteco por la jaro 2002 vakas

Ĉar Antti Mikkola, la nuna kasisto de la asocio, informis, ke li ne plu estos je la dispono por la jaro 2002, la estraro decidis anonci la taskon vakanta.

La tasko inkluzivas pagadon de fakturoj kaj prizorgadon de la bankkontoj de la asocio. Ankaŭ librotenado povas esti inkluzivita, se la kasisto volas tion fari. La kasisto devas kunlabori precipe kun la prezidanto kaj sekretario kaj kun eventuala aparta librotenanto. Laŭ la statuto de la asocio kasisto ne bezonas esti estrarano, sed tamen rajtas partopreni la estrarkunsidojn. La asocio ne povas oferti salajron, sed tamen rekompencas la elspezojn, kiuj ligiĝas kun la tasko. Avantaĝo por la kasisto estas loĝado en la ĉefurba regiono, ĉar la taskoj multe ligiĝas kun la oficejo. La prezidanto (adreso en la kolo-fono) akceptas sinproponojn.

La estraro

Vilho Setälä – medaloj ankoraŭ haveblaj

Venontjare fariĝos 110 jaroj post la naskiĝo de la plej eminenta ĝis nun finnlanda esperantisto, d-ro Vilho Setälä. Okaze de lia 90-jariĝo EAF siatempe farigis medalojn pri li. La medalon desegnis Heikki Varja, unu el la plej gravaj tia-tempaj medal-desegnistoj. La iniciaton pri la medalo faris Ahto Linja.

EAF ankoraŭ havas ioman stokon de medaloj kaj okaze de la 110-a naskiĝdatreveno de Setälä ĝi volas memori ĉiujn esperantistojn kaj lokajn klubojn pri la medalo. La medalo estas ege bona donaco aŭ premio por honorindaj personoj. La asocio vendas medalojn je 120 markoj (aŭ 20 eŭroj).

La estraro

Jubilea jaro de EAF en 2007

En la jaro 2007 Esperanto-Asocio de Finnlando fariĝos centjara. Kvankam ankoraŭ estas iomete frue, la estraro tamen jam komencis diskuti kiajn aranĝojn la asocio havu okaze de la jubilea jaro. Estas jam tempo baldaŭ fari certajn elpaŝojn koncerne la centjariĝo kaj tial la estraro planas fondi Jubilean Komisionon. Por povi efektiviĝi kiel eble plej konvenajn aranĝojn, la estraro jam nun volas komenci diskutadon pri la jaro kaj kolektadon de diversaj ideoj. Ni informos pri la antaŭenigo de la afero en postaj numeroj de EL.

Jukka Laaksonen

Vintraj Tagoj 2002 en Mikkeli

La estraro decidis post konsultiĝo kun lokaj esperantistoj okazigi la Vintrajn Tagojn 2002 en la urbo Mikkeli. La datoj kaj la loko ankoraŭ ne estas definitive deciditaj. Eventuale la datoj estos 16.-17.3. Lastfoje EAF aranĝis VT-ojn en Mikkeli en la jaro 1981.

Jukka Laaksonen

Esperantolehti ricevis subtenon

Edukministerio donis ĉijare inter aliaj diversaj gazetoj subtenon ankaŭ al Esperantolehti. La sumo estas 6300 markoj, kiu multe helpas la financojn de la gazeto kaj liberigas la redaktantojn por fari pli multflankan kaj bonaspektan gazeton. Bedaŭrinde la subteno temas nur unu jaron, sed la estraro kredas, ke estas bona ebleco, ke la ministerio donos subtenon ankaŭ por postaj jaroj. Ni nur devas memori, ke la financoj de la gazeto ne povas baziĝi sur daŭra jara subteno de la ministerio.

Jukka Laaksonen

Marjatta Linjama (1921-2001)

Marjatta Linjama mortis 31.3.2001 en Helsinko, kie ŝi naskiĝis kaj pasigis sian junaĝon kaj siajn lastajn vivjarojn. Intertempe ŝi laboris en Jyväskylä kiel tipografo en presejo.

Marjatta aktivis kiel delegito kaj kiel multjara prezidanto de Esperantoklubo. Ŝi sukcese informadis kaj varbis, aranĝis ekskursojn, i.a. plurajn al universalaj kongresoj. Kiel prezidanto de la finna KELI-sekcio ŝi invitis KELI-kongreson al Jyväskylä kaj estis ĝia ĉefa loka organizanto en 1988. Pri siaj aktivecoj Marjatta zorgis bonhumore kaj efike.



Esperanto-societo en Turku

Esperanto-societo en Turku estas jam 40-jara kaj kompreneble indas festi tion. La festotago estas dimanĉo, la 14-a de oktobro 2001 je 14.00 kaj la loko la (kompreneble!) Verda Salono de Kultura Centro de Turku. La salono troviĝas en la sama domo, Brinkkala, de kie estas deklarita la kristnaska paco ĉiujare. Dum la festo oni rememoras la pasintajn jardekojn. Programerojn kaj rememorojn prezentas ne nur la antaŭaj prezidant(in)oj kaj nunaj estrarmembroj sed ankaŭ ĉiuj membroj de la societo, kiuj partoprenas la feston. Ni ricevos ankaŭ eksterlandan gaston, s-ro'n Sylvan Zaft, kiu kun intereso sekvos nian feston kaj kompreneble havos ankaŭ parolvicon. Krome ni atendas multajn gastojn el aliaj finlandaj esperantokluboj. Por ke oni ne soifu kaj malsatu, ni rezervas bongustaĝojn por trinki kaj manĝeti. La partoprenkotizo estos 40 markoj. Bonvenon! Bonvolu aliĝi al nia sekretario Leena Tiusanen, (02) 232 0542 aŭ (050) 575 7956 aŭ rete <tiina.oittinen@pp.inet.fi>.

Estraro de EST

Esperantolerniloj en Finnlando

– ĉu ni havas sufiĉajn?

Esperanto-Ligo de Finnlandaj Instruistoj invitas al kuna studado 9-11 novembro. Ni konatiĝos kun diversaj ekzistantaj lerniloj kaj diskutos pri la eblecoj evoluigi ilin aŭ eĉ produkti novan materialon. Kian lernomaterialon ni bezonas en Finnlando? Kion ni povas realisme oferti? Ĉu iujn indas reeldoni?

Ĉiu kiu interesiĝas pri la laboro estas bonvena aliĝi. Ni rekomendas ke ĉiu klubo financu partoprenon de reprezentanto.

La kunveno finiĝos post lunĉo dimanĉe tiel ke ĉiu povu ankaŭ partopreni la klubkunsidon de Esperanto-Societo en Turku je la 14a horo.

Loko: Källkullen, Kimito-Kemiö. Kosto: 210 mk (inkluzivas manĝojn kaj loĝadon). Limdato por aliĝoj: 2 novembro. Aliĝo kaj pliaj informoj



Esperantovivo en la Saloregiono

Jes, ĝi daŭre vivas. La foto estas pruvo de tio. Temas pri la etulo naskiĝinta en 1978, pri Esperantoklubo de Salo, kiu ligas esperantistojn de la Saloregiono. Nun ĝi ankaŭ havas propran anonctabulon en la retpaĝoj de la regiona telefonkompanio: <www.salonseutu.fi>.

Sur la korto de Eero Saari (vicprezidanto) de Perniö, kaŭranta, videblas starantaj de maldekstre: Matti Wallius (prezidanto) de Muurla, Carola Antskog (estranano) de Kimito-Kemiö, Larbi Nassiri (vicestranano) de Salo/Uusikaupunki, Eero Laine (vicestranano) de Somero, Sinikka Hangas (sekretario kaj kasisto) de Koski TL, Anna Ritamäki (membro) de Kimito-Kemiö, Sylvi Ekman-Järvinen (revizoro) de Halikko kaj Liisa Lehtonen (estranano) de Salo.

de Carola Antskog tel. (02) 423146 aŭ rete: <cantskog@kolumbus.fi> (adreso sub ELFI en la listo de membroasocioj de EAF).

Eero Saari invitis la grupon kune festi la patriĝon de Larbi Nassiri, kiu ekloĝinte en Salo pasintjare, ekagadis por aktivigi la klubon. Interalie okazis esperantokurso kiun partoprenis kelkaj klubanoj. Dum la klubanoj ĝuis la marokan pladon de li preparitan li rakontis ke li planis translokiĝon al Uusikaupunki. Espereble de tie li daŭre sukcesos inspiri la Salo-klubanojn. (La informojn donis Anna Ritamäki.)

Jyväskylä esperantokerho

Kokoontumiset Sepänkeskuksen huoneessa Protoni keskiviikkoisin klo 16.30.

10.10. Aleksis Kiven Seitsemän veljestä.

24.10. Vaellusmatka Tatralla, Seija ja Kari Kettunen.

21.11. Sääntömääräinen syyskokous.

5.12. Kirjoitteleminen joulutervehdyksiä.

19.12. Nyytti-pikkujoulu ja Zamenhof-päivä.

9.12. Perinteiset joulumessut Hipposhallissa.

Raportti
Esperantolehdele



Kohde:
Timo Pirinen, 29 vuotta, Porvoo. Vapaaherra. Taskussa merkantin ja operaattorin paperit.

Status:
Valittu FEJO:n hallituksen jäseneksi 13.1.2001.

Ulkonäkö:
Varma tuntomerkki siniset farkut. Tulee toimeen vähälläkin laittautumisella: on lähtenyt viikon mittaiselle esperantokurssille mukanaan hammasharja ja pari vaihtopaitaa.

Mielentila:
Kutsuu itseään peitenimellä Malbonulo. Todellisuudessa on luonteeltaan rauhallinen ja pitkäpinainen. Lähisukulaisen mukaan suuttuu vasta pitkän ärsytyksen seurauksena.

Kansainväliset suhteet:
Suku lähtöisin Venäjältä, isoisa Kivennavan miehiä. Mahdollisia yhteyksiä ulkoavaruuteen. Todisteena oheinen valokuva.



Tradicia halhokea matĉo

Sabato 27.10. je 14.00
Sporthalo, Helsinko (La ekzakta loko aperos en FEJO-listo poste)

Vi bezonas nur bonajn sportŝuojn kaj -vestojn. Bezonatajn halhokeilojn ni povas lui surloke. Pasintjare Porvoo gajnis, eble nun la cetera Finnlando montros, kiu vere regas la esperantan halhokeon ... Venu por ludi kaj vivi!

Pli da informoj: <katja.lampinen@edu.stadia.fi>.

Espaj diskoj – facile kaj favorpreze

Se vi volas aĉeti bonajn espajn diskojn, memoru la Diskejon de FEJO. La sortimento inkludas ekzemple diskojn de Persone, Dolcxamar, Merlin, La Porkoj, Esperanto Desperado, JoMo, Jomart kaj Nataŝa, Jacques Yvart kaj tiel plu... Kontaktu Pipsa Ahonen <pipsa@mail.com> aŭ vizitu <www.esperanto.fi/fejo/diskejo>.

Kontaktit:

Nähty mm. Porvoon kirjastossa tietokoneen ääressä, Helsingissä sekalaisissa FEJO-rienoissa ja Anjalankoskella sukuloimassa.

Suhde esperantoon:

Kiinnostui esperantosta jo 15-vuotiaana, haaveili neutraalista kielestä. Aloitti kielen harrastamisen noin kaksi vuotta sitten Porvoossa neljän hengen opintopiirissä. Lähti mukaan FEJO:n toimintaan tämän vuoden alussa.

Arvio:

Tässä miehessä on ainesta.

Helsingissä 15.9.2001
Katja Lampinen

Esperantaj enamiĝoj?

60% de FEJOanoj spertis esperantan enamiĝon

Pasintsomere aperis la nova broŝuro de EAF, "Rakastu esperantoksi" (Enamiĝu esperante). Esperantolehti enketis inter FEJOanoj, ĉu oni sekvis la admonon. Membroj de retlisto de FEJO respondis la sekvan demandon:

Ĉu enamiĝoj, senklapiĝoj aŭ aliaj interesiĝoj al esperantoparolanto dum la plej lasta jaro? 62,50 % el FEJOanoj respondis jese, 37,50% ne enamiĝis esperante dum la plej lasta jaro. Inter la jes-antoj troviĝas eĉ internacia paro.



Ĉu vi pretas...

...por vidi Dolcxamar en la digitala televidilo?! Studentoj de Stadia Ammattikorkeakoulu de Helsinko produktas kvar kulturajn programojn por la nova digitala kanalo de Yleisradio, Teema. Unu programo temas pri konkurso. En tiu programo aperas ankaŭ Dolcxamar. Pieĉjo, Sarĉjo kaj Hipo prezentas la pecon *Pacman* kaj rakontas kurte pri sia bando kaj muziko. Kompreneble en Esperanto!

La ekzaktan daton por la programo oni ankorau ne scias. La programo estas parto de la serio, kiu nomiĝas Into, entuziasmo. Into-programojn oni elsendas marde je 22.30. Konatiĝu kun Dolcxamar en www.nettie.fi/dolcxamar kaj kun Teema en www.yle.fi/teema.

Janna kaj Simon:

La unuaj rigardoj dum salsokurso

La pasintsomera KEF ne havis nur kulturalan funkcion. Por Janna, finna FEJO-anino, kaj Simon el Danio, ĝi estis scenejo por personaj okazaĵoj.

Scivolemulino: Kie kaj kiel vi konatiĝis?

Simon: En Helsinko, ĉe la Kultura Esperanto Festivalo.

Janna: La 18-an de julio en salsokurseto dum KEF 2000. Ni dancis kaj pasigis ioman tempon kune dum la festivalo.

Sci-ino: Ĉu vi scias, ke EAF eldonis broŝuron "Enamiĝu esperante" nur kelkajn semajnojn antaŭ via konatiĝo? Vi litere kaptis la ideon...

Simon: Mi nur nun aŭdas pri la broŝuro... vi pravas, oni povas diri, ke mi litere kaptis la ideon!

Janna: Mi vidis la broŝurojn dum KEF. Estas ja bonega ideo, mi rekomendas ke ĉiuj provu...

Sci-ino: Ĉu en via kazo temis pri amo je unua rigardo?

Simon: Mi kredas, ke ne. Mi nur ŝin ŝatis.

Janna: Eble ne je la unua rigardo. Mi kredas, ke amo evoluas kun tempo. Sed mi tamen enamiĝis sufiĉe rapide.

Sci-ino: Ĉu "la bambo" havis influon al la naskiĝo de via rilato?

Janna. Mi kredas, ke ni estus enamiĝintaj eĉ sen la bambo, sed estis certe interesa sperto...

Sci-ino: Kiel la afero poste evoluis kaj kie vi nun loĝas?

Janna: Ni interŝanĝis adresojn kaj skribis multe kaj oftege unu al la alia...

Simon: ...kaj ni babilis rete

Janna: ...ĉiutage, mia telefonfakturo iom tro grandiĝis sekve de tio.

Simon: Post iom da monatoj mi invitis ŝin al Kopenhago...

Janna: Ni decidis, ke ni volas vivi kune, kaj vendrede dum la sama semajno mi transloĝiĝis al Kopenhago.

Sci-ino: Rapidaj agoj! Sed rakontu, kion vi ambaŭ faras en via kopenhaga vivo?

Simon: Mi studas komputilojn, plej parte vin-dozon 2000 kaj linukson, sed ankaŭ aliajn sistemojn.

Janna: Mi vizitadas enmigrolan kurson pri la dana lingvo, por ke mi kvalifikiĝu por studoj en Danio.

Sci-ino: Kaj kiel estas, ĉu Janna jam parolas la danan aŭ Simon la finnan?

Janna: Mi bone komprenas la danan; ĝi ja multe similas al la sveda. Oni ankaŭ alkiutimiĝas al la stranga prononcado post iom da tempo. Tamen mi ne multe parolas la danan, ĉar mi estas iom perfektama kaj ne volas erari. Simon diras, ke mia akcento estas ĉarma, sed mi ne kuraĝas paroli dane, se oni ne devigas min. Tamen mi provas.

Simon: Mi nur povas diri "kippis" kaj "moi" en la finna lingvo.

Sci-ino: Kio pri esperanto? Ĉu en via ĉiutaga vivo vi uzas esperanton?

Janna: Mi devas konfesi, ke ni ne ofte uzas esperanton. Kutime ni parolas la anglan, ĉar ni ambaŭ parolas ĝin multe pli flue ol esperanton. Sed ni provas paroli esperante kelkfoje.

Simon: Foje ni uzas esperanton en la komenco de la frazo, poste ni parolas la anglan. Mi ne sufiĉe bone parolas esperanton por uzi ĝin flue la tutan tempon. Estas multe pli facile paroli aliajn lingvojn kiujn ŝi ankaŭ komprenas. Ŝi komprenas ĉiujn miajn lingvojn.

Janna: Simon certe estas pli diligenta ol mi. Li volonte parolas esperante kiam li memoras. Mi mem pli ŝatas skribadon kaj multe interesiĝas pri gramatiko. Kontraŭe, Simon iomete freneziĝas se mi parolas pri gramatiko. Mi suspektas ke li kredas ke "akuzativo" estas fivorto.

Sci-ino: Kiel esperanto aliel rolas en via kuna vivo aŭ ĉu entute?

Simon: Ne multe.

Simon, sed ne salse. Ĉu rompdance? (Rompdanco = breakdance)



**Janna (maldekstre) kaj
Paula dum KEF2000.**

Janna: Ni kelkfoje vizitas esperantajn klubojn aŭ aranĝojn en Kopenhago. Lastavintre ni ankaŭ partoprenis AJN en Trondhejmo, Norvegio.

Sci-ino: Vi estas paro el du malsamaj landoj. Ĉu vi rimarkas kulturajn diferencojn en finn-dana rilato? Kiajn?

Janna: Mi kredas, ke la diferencoj inter Finnlando kaj Danio estas relative malgrandaj. Sed estas alia kultura diferenco, nome, ke mi vivis mian tutan vivon en malgranda urbo, Rauma, kaj Simon en ĉefurbo. Mia opinio mi tamen sufiĉe bone al kutimiĝis al vivo en la granda Kopenhago.

Sci-ino: Amrilatoj estas ne nur facilaj, ĉu ne? Kio estas la plej malfacila afero en la kuna vivo laŭ via opinio?

Janna: Kelkfoje oni traktas unu la alian kiel evidentajon. Precipe en nia rilato malfacilas, ke mi estas obstina kaj Simon senpacienca. Amuze, ĉu ne...?

Simon: La plej malfacila parto en nia kuna vivo estas, ke mi devas akcepti, ke mi estas mi kaj ŝi estas ŝi kaj mi ne povas influ tiun, kia ŝi estas.



Sci-ino: Dankon pro la intervjuo kaj ĉion bonan por via kuna estonto!

Ps. Ĉu vi jam rimarkis, ke la vestovendejo H&M sekvas reklamlinion tre similan al nia broŝuro? "Fall in love" (Enamiĝu) estas la aŭtuna frapfrazo ĉe H&M.

La bambo (tradukis: A. Zocato)

*Por dancadi la bambon
Por dancadi la bambon
Necesas jeno: kulereto da ĉarmo,
Kulereto da ĉarmo kun petolemo.
Al la supro, la supro...
Al la supro, la supro,
Alvenos mi,
Kaj fariĝos maristo
Kaj fariĝos maristo
Se volas vi
Se volas vi
Se volas vi*

Danĉu la bambon! ...

*Por atingi ĉielon
Por atingi ĉielon,
Necesas lerto kune kun ŝtuparego,
Kune kun ŝtuparego kun suplemento.
Al la supro, la supro...*

*Hejme ĉiuj min taksas
Hejme ĉiuj min taksas
Naiva viro, ĉar mi vere galantas
Ĉar mi vere galantas al junulinoj.
Al la supro la supro...*

Hatuton si, sin, sia

Nämä sanat viittaavat edellä olevaan tekjään, johonkin ”häneen” tai ”heihin”, yksikköön tai monikkoon, mieheen tai naiseen. Joskus ne vastaavat suomen itse-sanaa, mutta niitä ei käytetä muissa kuin 3. persoonassa.

Li promesis al si ke li neniam plu drinkos. Hän lupasi itselleen ettei enää koskaan ryyppäisi.

Petro kaj Anjo acetis al si du lotojn. P. ja A. ostivat itselleen kaksi arpaa.

Eva estas tro postulema al si. Eva vaatii itseltään liikaa.

Oletetaanpa neljä henkilöä, pari Petro ja Anjo ja toinen pari Paūlo ja Eva. He käyvät kävelymässä.

Petro promenis kun sia amikino. (kun Anjo)

Petro ne promenis kun lia amikino. (kun Eva)

Toisena iltana Anjo oli kävelyllä yksin ja Petro tarkkaili häntä jostain kauempaa.

Li vidis fremdan viron kisi lian amikinon. (Hälyttävää! Vieras suuteli hänen ystävänsä Anjoa.) Ehkä tuo oli vain kuvittelua. Ehkä kävikin näin: *Li vidis fremdan viron kisi sian amikinon.* (Hellyttävää! Vieras suuteli omaa ystävänsä.)

Itse asiassa Anjolla oli liikaa työtä ja vähän tylsää. *Ŝi deziris ne ĉiam okupiĝi pri sia familio.* Hän toivoi ettei aina tarvitsisi huolehtia perheestään. Mutta käytännössä hän joutui auttamaan vielä toistakin perhettä ja siksi tällainenkin toive nousi mieleen: *Ŝi deziris ne okupiĝi pri iliaj aferoj.*

Jotkut käyttävät *sin*-sanaa kun selvempi olisi *unu la alian*. Otetaan tilanne vaikka parranajosta.

Petro kaj Paūlo razis unu la alian. (miehet ajoivat toinen toisensa parran); *Petro kaj Paūlo razis sin.* (miehet ajoivat partansa)

Ja jos he ovat partureita työkseen, niin tavallinen tapaus olisi tämä: *Petro kaj Paūlo razis ilin.* (he ajoivat asiakkaiden parran)

Ja tässäpä dramatiikkaa novelliksi asti: *Ili trompis unu la alian.* (pettivät toinen toistaan) ja ai-

neettomammalla tasolla *Ili trompis sin* (pettivät itseään).

Kaj ja kun -sanat aiheuttavat hämmennystä, koska ne vaikuttavat eri tavalla lauseen jäsentymiseen.

Anjo kun sia amiko Petro vizitis nin. (lauseen subjekti on *Anjo kun Petro* ja *sia* viittaa siihen)

Mutta: *Anjo kaj ŝia amiko Petro vizitis nin.* (lauseessa on 2 subjektiä, *Anjo* ja *Petro*, *sia*-pronominia ei käytetä)

Tämä alkaa mennä jo saivarteluksi, jota voi vielä jatkaa:

Petro petis Anjon fari lian taskon. (Anja tekisi Petron työn); *Petro petis Anjon tuj fari sian taskon.* (Anja tekisi oman työnsä heti)

Mutta palataanpa helpommalle alueelle:

Petro sentis sin laca. (Petro tunsu itsensä väsyneeksi); *Paūlo ne rekonis lin en la foto.* (Paūlo ei tuntenut häntä kuvasta)

Tällaisiakin sanoja tulee vastaan: *sindefendo* itsepuolustus, *singarda* varovainen, *sindona* äärimmäisen avulias ja uhrautuvainen, *sin trotaks-eco* itsensä liika arvostaminen, *siatempe* aikanaan, *siaflanke* omasta puolestaan. Nyt vain noudata neuvoa *Metu ĉion sur sian lokon* eli pane kaikki paikalleen.

On tullut jo tavakseni lopettaa sananparsilla:

En ĉiu kranio estas sia opinio. Niin monta mieltä kuin on miestäkin.

Por ĉiu afero estas sia tempo. Kaikella on aikansa.

Saliko

P.S. Minulta alkavat Kielinurkan aiheet loppua. Vain teidän lähettämänne lisäaiheet voivat jatkaa Kielinurkkaa vuonna 2002. Miettikääpä, onko ehdotuksia! Osoite: Raita Pyhälä, Jykyrintie 3, 69440 Lestijärvi, sähköposti <raitapy@jymy.kase.fi>.

Suomen esperantoliiton jäsenjärjestöt

Muutokset ja lisäykset osoitteistoon Ilkka Santtilalle, Tollinpolku 1 B 21, 00410 Helsinki, s-posti ilkka.santtila@esperanto.fi mieluummin kirjallisena.

Suomen Esperantoliiton paikallisyhdistykset toimivat:

- ♦ Helsingissä: Helsingin Esperantoseura / Esperanto-klubo de Helsinki, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. ☒ Sakari Kauppinen, sakari@skau.pp.fi
- ♦ Iisalmessa: Iisalmen Esperantoklubi / Esperantoklubo de Iisalmi, (Onni Kauppinen) Uudispihantie 298, 74100 Iisalmi
- ♦ Jyväskylässä: Jyväskylän Esperantokerho / Esperantoklubo de Jyväskylä, (Terttu Tyynelä) PL 136, 40101 Jyväskylä
- ♦ Lahdessa: Lahden Esperantokerho / Esperantoklubo de Lahti, (Martti Pennanen) Kalliomaankatu 10, 15150 Lahti. ☒ martti.pennanen@pp.phnet.fi
- ♦ Mikkelissä: Mikkelin Esperantokerho / Esperantoklubo de Mikkelä, (Elli Husso) Porrassalmenkatu 27 B 51, 50100 Mikkelä.
- ♦ Oulussa: Oulun Esperantoseura / Esperantosocieto de Oulu, (Allan Mehtonen) Valtatie 6-8 B 15, 90500 Oulu
- ♦ Salossa: Salon Esperantoseura / Esperantoklubo de Salo (Matti Wallius) Eräpolku 1, 25130 Muurla ☒ matti.wallius@pp.inet.fi
- ♦ Tampereella: Esperantoseura Antaūen ry. / Esperantosocieto Antaūen, Satakunnankatu 30 C 6, 33210 Tampere. (Rainer Arvola, Käräjätörmä 2 E 32, 33310 Tampere, ☒ andromeda@koti.tpo.fi)
- ♦ Turussa: Turun Esperanto-yhdistys ry. / Esperanto-societo en Turku, (Tiina Oittinen) Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku. ☒ tiina.oittinen@pp.inet.fi
- ♦ Lappeenrannassa esperanton harrastajilla ei ole järjestöä, vaan "esperantoryhmä", jolle voi lähettää postia osoitteeseen (Irja Miettinen) Esperantogrupo de Lappeenranta, Yrjönkatu 6-8 A 1, 53600 Lappeenranta.

Lisäksi Suomen Esperantoliittoon kuuluu

- ♦ Suomen opettajain esperantoliitto / Esperanto-Ligo de Finlandaj Esperantistoj, (Carola Antskog) Dragsfjärdsvägen 690, 25700 Kimito. ☒ cantskog@kolumbus.fi. Tilinro: 800015-129185
- ♦ Suomen nuorten Esperantoliitto / Finnlanda Esperantista Junulara Organizo (FEJO) Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. ☒ fejo@esperanto.fi. Tilinro: 101130-227446
- ♦ Sokeiden esperanto-yhdistys Steleto. (Ritva Sabelli) Pietarinkatu 10 D 27, 00140 Helsinki. ☒ Ritva.Sabelli@sfs.fi ☎ (09) 660 651

Useiden paikkakuntien puhelinluettelosta hakusanan "Esperanto" kohdalta löytyy paikallisten harrastajien puhelinnumeroita.

ESPERANTOLEHTI

ilmestyy vuonna **2001**
aperas dum la jaro

Nro	Red.grupo	Limdato	Aperas komencas
6	1.11	15.11	1.12

Avustajien toivotaan noudattavan edellä esitettyjä aikoja. La redakcio esperas, ke helpantoj atentu la datojn supre.

Ilmoitushinnat

Ulkopuoliset mainostajat:	Jäsenet:
1/1 sivu 600 mk	1/1 sivu 300 mk
½ sivua 400 mk	½ sivua 200 mk
1/4 sivua 250 mk	1/4 sivua 125 mk

Palautusosoite: Esperantoliitto
Siltasaarencatu 15 C 65, 00530 Helsinki

Aŭstria Esperanto-Movado ofertas:

AT 1050 Wien, Margaretenürtel 100/11/2

Wien 48 paĝoj 45,- FIM

Gvidlibro de la bela urbo Vieno. Kolore ilustrita, en la lingvoj Esperanto, angla kaj germana.

Devizoj 112 paĝoj 26,- FIM

Kolekto de malicaj spritaĵoj pri la oficeja vivo, la mono kaj la virinoj.

Kion travivis aŭstria familio en la brazila praarbaro. 196 paĝoj 70,- FIM

Veraj aventuroj de eŭropanoj en Ameriko.

Pri la pagmaniero ni informos vin per nia fakturo. Petu nian katalogon!

Seuraava numero ♦ Venonta numero

Seuraava numero ilmestyy joulukuun alussa. Jutut 15.11.2001 mennessä Aimo Rantaselle. Venonta numero aperos en la komenco de decembro. Artikoloj ĝis 15.11.2001 al Aimo Rantanen. Osoite/adreso: PL 2, FIN-40801 Vaajakoski, puh/tel. (014) 261 438, s-posti/rete: <esperantolehti@esperanto.fi>.